

La lingva situacio en la hodiaŭa mondo, 5-a parto
Radioprelego de Claude kaj Andrée GACOND, SRI 548, 1974.04.10 & 13

Cl.- Parolas gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond.

Ni konkludos nian prelegaron pri la lingva situacio en la mondo per konsideroj pri la ŝancoj de Esperanto.

A.- Inter la kvin eblaj evolu-eblecoj de la mondlingva situacio, 4 estas ne malfavoraj al Esperanto. Ili estas tiuj, kiuj nur registras faktojn. Jen ili :

Cl.- a) Se kreskos la nombro de la lingvoj oficiale uzataj en la mondorganizaĵoj, Esperanto havos ŝancon iom post iom konkeri statusajn poziciojn en iuj organizaĵoj. Antaŭ ĉio la financaj kaj teknikaj problemoj rezultantaj de la samtempa interpretado kaj de la tradukado de kreskanta nombro da dokumentoj favoros la ekuzon de Esperanto en registaraj instancoj.

A.- b) Se stabiliĝos la nuna lingva situacio Esperanto trankvile daŭrigos sian marŝon antaŭen.

Cl.- c) Se la mondorganizaĵoj, konservante saman nombron da oficialaj kaj laboraj lingvoj, tamen decidis reelekti de tempo al tempo la privilegiajn lingvojn laŭ la evoluo de la lingva situacio en la mondo, Esperanto estos en favora situacio. Ĝia nura kandidatiĝo permesos efikan propagandon ĝis la decidiga tago, kiam ĝi estos je voĉdono preferata al etna lingvo.

A.- d) Se la mondorganizaĵoj decidis oficialigi nur la geografie plej disvastiĝintajn lingvojn, ni eniros tutmondan trilingvismon anglan, araban kaj hispan-portugalan. En tiu situacio ankaŭ la plej disvastiĝinta planlingvo devos esti konsiderata. Tio povos favori Esperanton.

Cl.- La evolu-ebleco, kiu povas esti malfavora al Esperanto estas la sekva : UN decidis elekti mondan interlingvon. Lingva komisiono devos pritrakti tiun problemon. Ni povas antaŭvidi tri eblajn konkludojn al ĝia lingva analizo. Aŭ ĝi proponos la elekton de la angla pro ties kultura, scienca kaj ekonomia graveco ; aŭ ĝi proponos la elekton de Esperanto ; aŭ plej probable ĝi proponos la ellaboron de pli taŭga kaj pli universala planlingvo.

A.- En la interlingva historio ni havas 5 ekzemplojn de diskutoj koncerne esperanton kaj planlingvistikon. Oni konstatas, ke ĉiufoje la situacio estis aŭ komplete malfavora al Esperanto, aŭ tute ne kuraĝiga. Ni ekzamenu kial. Sed unue ni memorigu tiujn diskutojn.

Cl.- Fine de la pasinta jarcento la Volapuka Akademio, post provo reformi la lingvon de Schleyer, decidis reekzameni la planlingvan situacion. El tiu reekzameno naskiĝis la lingvo-projekto **Idiom Neutral** kaj la **naturalisma** tendenco, kies celado estas la kreo de latineca planlingvo. **Latino sine Flexione** de Peano, **Occidental** de von Wahl kaj fine **Interlingua** de Gode estas la fruktoj de tiu orientiĝo.

A.- Komence de nia jarcento la franca filozofo Couturat starigis Delegacion, kiu devis decidi, kiu planlingvo estus subteninda far la registaroj kaj universitatoj. Tiu delegacio konkludis sian rapidan ekzamenon de la mondlingva bezono per la propono de reformo de Esperanto nomota **Ido**. Naskiĝis malfeliĉa skismo, kiu malfortigis la ideon mem de universala planlingvo. Tamen tiu situacio kondukis la ĝenevanon René de Saussure al esplorado de la vortfarado de ambaŭ lingvoj. Ni troviĝas antaŭ la unua scienca observado de Esperanto.

Cl.- Post la unua mondmilito Ligo de Nacioj interesiĝis pri Esperanto. Ĝia Kultura Komisiono fine konkludis malfavore al la zamenhofa lingvo. Estis preferata la bilingvismo angla-franca.

A.- Preskaŭ samtempe estis fondita en Usono la asocio **International Auxiliary Language Association** aŭ **IALA**. Ĝia esplorado de la mondlingva problemo naskis la lingvo-projekton **Interlingua** en 1951.

Cl.- Fine vi scias, kiel disvolviĝis en 1954 la debatoj pri Esperanto en la Ĝenerala Asembleo de Unesko en Montevideo. Sen la advokata talento de doktoro Ivo Lapenna neniam estus akceptita la mildigita resolucio, kiun ni ofte mencias.

A.- En tiuj debatoj pri Esperanto kaj planlingvistiko la pozicio de la esperantistoj estas ege malfacila. Ili riproĉas al la neesperantistoj pritrakti aferon, kiun ili ne konas. Aŭtomate la neesperantistoj havas la impreson troviĝi antaŭ fanatikuloj. Mankis kapablaj lingvistoj por science demonstri, kio faras la originalecon de Esperanto. Tiuj demonstroj estos eblaj nur kiam ekzistos sufiĉe da esperanto-katedroj en la universitatoj, da studcentroj pri Esperanto kaj interlingvistiko, da arkivejoj pri planlingvistiko, da publikaĵoj kie la studoj de la serĉantoj povos aperi. Devas formiĝi fakularo kapabla diskuti kun lingvistoj, filologoj, sociologoj kaj politikistoj. Nur kiam tiu klerularo ekzistos, la esperanto-movado povos alfronti sciencan debaton pri la mondlingva problemo kun ŝanco povi aŭdigi sian vidpunkton.

Cl.- Vi aŭdis prelegon el Svislando. Parolis gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond. Ĝis reaŭdo!